

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1070 (40/2020)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Cambio delle liste di messaggistica on line 2
- Pola Radio intervjuis Carlo-n Minnaja 2
- Conferenza di etimologia sulle radici in Esperanto 2
- Dialoghi su Zamenhof..... 3
- Kungfua Kuniklito naturmedie konscia 3
- Giornata per l'eliminazione della violenza sulle donne 3
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton..... 4
- Zamenhof senza l'Esperanto..... 4

CAMBIO DELLE LISTE DI MESSAGGI ON-LINE

Laura Brazzabeni, vice presidente FEI con incarico per le liste di distribuzione on line, ci informa che l'attuale lista "esperantisti-italiani" basata su Yahoo dovrà passare a Google, dato che dal 15 dicembre cesseranno i servizi Yahoo. Il passaggio da una lista all'altra non è, purtroppo, automatico, per cui vi preghiamo quindi di inviare un messaggio a esperantisti-italiani+subscribe@googlegroups.com, in modo da trasferire tutti gli iscritti nella nuova lista. Google chiede che ognuno mandi il messaggio per ognuno degli indirizzi su cui intende ricevere i messaggi: non è possibile fare una iscrizione d'ufficio.

POLA RADIO INTERVJUIS CARLO-N MINNAJA

Ni ĝojas komuniki ke Pola Radio dediĉis parton de du sinsekvaj dissendoj al intervjuo al Carlo Minnaja pri la laboro de la literatura sekcio de la Akademio; en ĝi li parolis ankaŭ pri la laboro de la Akademio ĝenerale. La afero estis stimulita de la anonco de la Laŭro de la Akademio. Ili estas aŭskulteblaj ĉe

www.pola-retradio.org.

La retejo estas bone organizita: alklakante la supran retadreson oni havas panoramon pri ĉiuj antaŭaj dissendoj (ĉiu daŭras ĉ. 25 minutoj, inkluzive muzikajn etajn intervalojn); sendepende de esperantomediaj anoncoj, oni povas aŭskulti tre interesajn novaĵojn pri la tuta mondo.

Do ĝis nun raportis pri la premio ankaŭ LOdE kaj LItatura Babilejo, kaj certe ankaŭ la nov-dec n-ro de Literatura Foiro. Limdato por la kandidatiĝo de verkoj estas junio.

CONFERENZA DI ETIMOLOGIA DELLE RADICI IN ESPERANTO

Lunedì 30 novembre, alle 18:00 Giorgio Denti terrà in lingua italiana una conferenza dal titolo: "L'etimologia delle radici in Esperanto, un viaggio alla scoperta di molte curiosità". La conferenza avverrà sulla piattaforma Zoom al seguente link:

<https://us02web.zoom.us/j/84245125623>

ID riunione: 842 4512 5623

DIALOGHI SU ZAMENHOF

In occasione della Zamenhof-festo la Fei presenta un dialogo a due voci sul creatore dell'Esperanto. Partecipano Renato Corsetti e Laura Brazzabeni (vicepresidente Fei). Discorso introduttivo di Luigi Fraccaroli (presidente). L'evento sarà online sulla piattaforma Zoom, martedì 15 dicembre alle 19. Per qualsiasi questione anche di natura tecnica contattare ttt@esperanto.it. La conferenza sarà in lingua italiana ed aperta a tutti

KUNGFUA KUNIKLETO NATURMEDIE KONSCIA – EN ESPERANTO

La filmstelulo Kungfua Kunikleto kaj liaj geamikoj pace batalas en Esperanto por savi la naturan medion! Nova tute internacia projekto planas serion da animaciaj filmaj epizodoj kiuj samtempe amuzos kaj lernigos infanojn tra la tuta mondo. Ĝin akompanos serio de libroj, ĉiu en du lingvoj, nome Esperanto kaj la lingvo de la koncerna regiono; kaj la Esperanto-originalon sekvos adaptoj en aliaj lingvoj. La komenca sponsorado por la projekto venas el Ĉinio, la reĝisoro kaj enscenigisto estas hispanaj, kaj la komencan filmon oni muntas en Romo, kun subteno de la Itala Esperanto-Federacio. Nun planata estas epizodo en kiu heliko kaj gazelo parolos en Esperanto, je la granda ĝojo de ĉiuj aliaj bestetoj. La gvidantoj de la projekto rezonas, ke, pli kaj pli, infanoj kreskas en urboj kaj ne spertas la naturon: por ĝin savi, necesas ĝin kompreni. Vidu: <https://www.youtube.com/watch?v=rwlx46xYLWm&feature=youtu.be>

GIORNATA PER L'ELIMINAZIONE DELLA VIOLENZA CONTRO LE DONNE

25 novembre 2020
Giornata Internazionale per l'eliminazione della Violenza contro le Donne

Trasmissione radio-video su "Radio Sbaam TV" - Web Radio, Social Radio
in diretta sulla pagina ufficiale Facebook - Ore 20:00-21:00

Introduce
Pina CATINO Presidente Club per l'UNESCO di Bisceglie

Conduce
Antonella PAGANO Sociologa, scrittrice - autrice e conduttrice della Trasmissione Evento radio/audio/video/web. Ideatrice e produttrice SPOT "2020 Rifiorire", per l'Edizione 2020 della Giornata Internazionale

Saranno letti gli interventi scritti
Marco TORRISI Dirigente Radio Sbaam TV
Jaqueline BARBA Musicista
Nella CIRINNA Regista RAI, Musicista e Presidente "WA - International Woman Association"
Maurizio D'ANGELI Libero professionista - Protagonista spot
Neria DE GIOVANNI Presidente "Bureau International des Critiques Littéraires" - A.I.C.L. - Editrice NEMAPRESS
Laura DI CARLO Scrittrice, Editrice
Carla DURANTE Libero professionista - Giornalista ELLERADIO
Marina FORNARO Docente di Inglese
Simone GAETA Libero professionista - Protagonista spot
Michela LIPARI post Presidente FEI "Federazione Esperantisti Italiana"
Paola NAZZARO Costume and Fashion designer per il Cinema, Scrittrice
Adriana PAOLUCCI Pedagogista per bambini con disabilità
Arianna FIGINI Presidente Associazione l'Abbraccio del Mediterraneo
Mariastella SALMI Presidente Associazione "Luce dell'Anima"
Patrizia VALERI Avvocato-Cassazionista e Componente Commissione Diritti Umani Consiglio Ordine degli Avvocati

Le Classi Quinte del
LICEO SCIENTIFICO "LEONARDO DA VINCI" - BISCEGLIE
D.S. Rosa FAVALE

Michela Lipari leggerà una poesia di Antonella Pagano sul tema, tradotta in esperanto. L'evento potrà essere seguito in diretta sulla pagina Facebook di Radio Sbaam TV.

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON



ZAMENHOF SENZA L'ESPERANTO

Per tutti noi è La Majstro (anche se lui non voleva essere chiamato così): ma cosa sappiamo di lui oltre all'essere l'inventore della nostra lingua? Ce lo racconta, in questo bell'articolo, Gian Carlo Fighiera.

En 1959 Unesco -la organismo de la Unuiĝintaj Nacioj kiu reprezentas ĉ. 200 landojn en la kampo de edukado, scienco kaj kulturo- oficiale aliĝis al la tutmondaj celebroy de la centjara naskiĝtago de Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Jam antaŭ tiu jaro la meritoj de la aŭtoro de Esperanto estis mondscale rekonitaj: al lia nomo aŭ al lia ĉefa verko, landoj kaj urboj dediĉis ĝis nun pli ol mil stratojn, placojn, monumentojn, memortabulojn, poŝtmarkojn, sciencajn eltrovaĵojn (ekz. asteroidojn), publikajn servojn (kiel fervojajn liniojn, ŝipon) kaj eĉ urbon (Herzberg/L en Germanio): en Torino ekzistas Ĝardeno Zamenhof. Pro kio, do, Zamenhof eniris en la liston de la grandaj personecoj de la homaro? La plej spontana respondo estas: pro la kreo de Esperanto. Tamen, analizante lian multifacetan mondkoncepton oni rimarkas ke Esperanto estis nur unu el la sociaj, religiaj kaj politikaj projektoj al kiuj li dediĉis sian tutan vivon.

Por respondi al la supra demando ne sufiĉas konsulti la multajn biografiojn pri Zamenhof; prefere ni legu lian tutan originalan verkaron en kiun li enverŝis sian viv-idearon: temas pri dekoj da artikoloj kaj paroladoj krom centoj da leteroj (1).

Kaj ju pli ni enprofundiĝas en tiun legadon, des pli ni estas frapitaj de la esceptaj moralaj kaj intelektaj dimensioj de la homo Zamenhof, sendepende de la de li kreita Esperanto. (Tiun disduecon mi ekkomprenis dum la solena inaŭguro en Torino de la pola ekspozicio pri li. El kvar oratoroj nur la prezidantino de IEF akcentis -kunlige kun la nomo de Zamenhof- la valorojn de Esperanto: la aliaj tri oratoroj, nome la reprezentantoj de la kulturdomo kaj de la pola kaj juda komunumoj, substrekis, ja, la elstarecon de Zamenhof respektive kiel pensulo, kiel polo kaj kiel judo, sed ignoris Esperanton).

Se paroli pri la personeco de Zamenhof sendepende de Esperanto, ni komencu unue de liaj karakteraj trajtoj, nome grandaj mildeco, modesteco kaj humileco. Ni memoru ke li tuj rezignis la aŭtorrajtojn rilate al Esperanto, (malgraŭ lia prema vivmizero en la komenca periodo de la lingvo (2)), ke li konsideris sin ne la aŭtoro sed nur la iniciatinto de la lingvo, ke dumvive li rifuzis ĉiujn postenojn kaj honorojn (en 1910, laŭ Künzli, li malaprobis la proponon kandidatiĝi lin al Pac-Nobelpremio), ke eĉ petegis la esperantistojn ĉesi nomi lin „majstro“ (3). Ni memoru ke li permesis al la organizantoj de la 1-a Universala Kongreso cenzuri lian „Preĝo sub la verda standardo“ (4), ke li akceptis voĉdonadon celantan reformi lian propran lingvon (5), ke li grandanime eĉ laŭdegis Martin Schleyer, la kreinton de Volapük lingva konkurecanto de Esperanto. Eble lia plej grava anima trajto estis la amo al la homaro. Se oni farus studon pri la vortofteco en la verkoj de Zamenhof, oni trovus ke lia plej ofta vorto estis „la homaro“, la homaro suferanta, la homaro dividita. Preskaŭ fizike dolorigis lin la muroj starantaj de jarmiloj inter la popoloj dividitaj.

Por batali kontraŭ tiuj muroj la simpla okulisto Zamenhof transformiĝis de teoria pensulo en organizanton de praktikaj projektoj. La plej nobla, kvankam sensukcesa, idealisma movado de li fondita nomiĝis „homaranismo“, inspirita de konceptoj pri egaleco kaj solidareco inter homoj. Laŭ la patro de Esperanto, kontraŭ homaranismo opoziciis la altrudoj de religia „blinda fervoro“ kaj la

politika ŝovinismo (6).

Opozicie al ili ni trovas novan Zamenhof predikantan en paroladoj kaj artikoloj amon inter la homoj, super la apartenoj al etnoj, religioj kaj ŝtatoj, sed respektante ĉi lastajn.

Rilate al religieco li, edukita en nereligia familio, sed mistika Di-kredanto, antaŭtempe aŭspiciis ian ekumenismon -tute ne sinkretismon- de la tri monoteismoj (7). Pasis preskaŭ unu jarcento por ke lia vizio en niaj tagoj ekrealiĝu. Rilate al ŝovinismo, lia batalado kontraŭ la ekstremaj naciismoj de la periodo antaŭ la tragedio 1914-1918 (kun ties eĉ pli gravaj sekvoj en la postaj jaroj) atingis plej vibrantajn polemikajn tonojn. La milda Zamenhof difinis la diferencon inter patriotismo, pozitiva amo al propra patrio, kaj ŝovinismo, detrua malamo al ĉio ekstera (8). En 1914, jam en Francio survoje al la planita, sed lastmomente nuligita, Universala Kongreso en Parizo, Zamenhof vidis ĉiujn siajn revojn detruitaj de la mondmilito. Reveninta al Pollando tra Svedujo, li tiam firme decidis plue lukti, li sola, por la paco.

Kiel forgesi lian lastan ĉefverkon, la grandaniman „Letero al la diplomatoj“? En ĝi li (1914-17) -anticipante la 14 punktojn de Wilson (1918)- admonis la gravulojn, en estonta packonferenco ne fliki arbitre novan mapon de Eŭropo forprenante kaj donacante laŭ propra plaĉo naciajn teritoriojn, ĉar „ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj“. La sama dokumento eĉ profetas du estontajn realaĵojn, nome Supernacian Eŭropan Tribunalon kaj Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo (9).

Konklude. Ludoviko Lazaro Zamenhof meritis eniri en la liston de la grandaj historiaj figuroj de la mondo pro liaj kontribuoj per instruoj kaj faroj al la interhoma frateco, pro la etika dimensio de lia personeco. Eĉ sendepende de Esperanto.

- (1) Adiciante la originalajn kaj tradukajn verkojn, eblas taksi ke li publikigis ĉ. 1500 presitajn paĝojn (la sola tradukita Biblio ampleksas centojn da paĝoj) en senkompare eleganta, flua, modela, ofte poezieca kaj lirika Esperanto.
- (2) En privata letero al Michaux, Zamenhof konfesas, ke en la jaroj de sia deĵorado kiel okulkuracisto en kamparo li ofte suferis malsaton.
- (3) En Krakovo, en 1912, li anoncis ke estonte dum la UK li ne plu aperos sur la podio inter la aŭtoritatoj, sed sidos inter la publiko kiel simpla kongresano.
- (4) Forigante la kernan strofon „Kristanoj, hebreoj kaj mahometanoj ni ĉiuj de Di' estas filoj“.

(5) En 1905 li vane proponis aldoni en la „Deklaracio pri Esperantismo“ la promeson rezigni pri Esperanto se iam aperos pli taŭga supernacia lingvo.

(6) Rilate al religio Zamenhof malkorekte uzis eĉ en sia homaranismo (eble sub influo de la pola aŭ de la rusa) la vorton „dogmo“ en la senco de „principo“ aŭ „regulo“.

(7) Zamenhof donis ekzemplon, publikigante en la Unua Libro de Esperanto tradukon de la kristana preĝo „Patro nia“, kvankam li mem estis hebreo.

(8) Memorinda restas lia kortuŝa amdeklaro al la patrujo (1907), en kiu iel reeĥas la ario de Nabucco „Vi staras nun antaŭ miaj okuloj... mia malfeliĉa patrujo...“

(9) Aliflanke, surpriziga estas la talento de la profeto Zamenhof kiel pragmata organizanto de asocioj: tion pruvas la detalaj projektoj de statutoj de li redaktitaj por Homaranismo kaj por la estonta UEA.

Parenteze, UEA-n fondis Hodler laŭ ripetita sugesto de Zamenhof.